

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

39-a Jarkolekto - Decembro 2025 - N-ro 139



Trevélez

(Granado)

Oktobro / Decembro 2025

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.
- P. 08 Tutmondiĝo kaj minoritataj lingvoj, ne tiom malamikaj rilatoj.
- P. 10 Lingva Angulo:
La preposición SUB
- P. 14 Poezia Angulo.
- P. 15 Nuntempa Vortaro:
Naĝejo.
- P. 17 Folioj por Praktikado.
- P. 21 Turismi en ... *Trevélez (Granado)*
- P. 25 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: *Alfonso Barranco Medina, jaena esperantisto kaj socialisto.*
- P. 27 Humuro.
- P. 28 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
La paradokso de la ŝipo de Tezeo.
- P. 30 Flamenko: *La Triana Kvartalo en Seviljo.*
- P. 32 Fervojista angulo:
La vaker-filmaj trajnoj de Almerio.
- P. 34 Komikso: *Fiŝ-Historio*
- P. 41 Nia asocio eldonis novan libron!
- P. 42 Nun Ni. Junulara Paĝo.
- P. 43 Ŝako: *Enfili pecon.*
- P. 46 Skolta Mondo.
- P. 48 Andaluzia Kuirarto:
Alpuhara Supo.
- P. 50 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio:
Fenicaj sarkofagoj en Kadizo.
- P. 52 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:

José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante

COLABORADORES:

Cristina Bollini
Carlos Spínola



Sur la kovrilo:

Vidaĝo de Trevélez (Granado)

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Ĉarma ekspozicio en Sevilo

La pasintan monaton aprilon, okazis en la Kultur-centro la Sirendomo de Sevilo, ekspozicio organizita de Sevila Esperanto-Asocio, sub la temo “*Primavera Universal*”, alloga lingva miksaĵo de la vortoj *Printempo* kaj *Universal*. La celo de la ekspozicio estis montri, en esperanto-lingvo, kelkajn tipajn objektojn de sevilaj printempaj festoj. Falbala robo, lampionoj kaj ĉiuaspektaj foiraj informoj aperis en la ekspozicio por komprenigi, ke tiuj objektoj ne estas nur sevilaj sed ja universalaj, kaj nun plie se oni uzas la internacian lingvon. Vizitis la ekspozicion centoj da homoj dum kvin tagoj.




La Festoj de la Sevila Printempo kaj Esperanto, jen temo por ĉarma ekspozicio, organizita de Sevila Esperanto-Asocio ĉe la kultur-centro "La Siren-domo".




Nova libro en esperanto eldonita en Andaluzio

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo publikigis novan libron. Temas pri la poem-libro de Ángel Arquillos “*Ekkrias la Poeto. Poemoj kaj Hajkoj*”. Pri la enhavo, vi povos legi sur la paĝo 41-a, tamen indas diri nun, ke ĝi estas la 12-a libro eldonita de nia asocio, kaj kompreneble, ĝi ne estos la lasta. Nova eldonaĵo prasideblas post kelkaj monatoj.



Andaluzo kunverkis sciencan libron en esperanto

Kunverkita de la israela astrofizikisto Amri Wendel kaj la inĝeniero-doktoro Carlos Spínola, de Malago aperis la libro “*Astronomio kaj astrofiziko por Ĉiuj*”.



Temas pri la teksto de prelego prezentita dum la Internacia Kongresa Universitato 2025. Carlos Spínola estas fizikisto kaj doktoro-inĝeniero pri Komputikaj Sciencoj. Li estas profesoro en la Universitato de Malago, kaj kunfondito de la Informadikaj Studoj en tiu universitato, krom aktiva membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Amri Wendel estas israela astrofizikisto kaj profesoro en la Universitato de Jerusalemo.

La libro estas eldonita de la Internacia Akademio de la Sciencoj.

Nova numero de *Jura TRIBUNO Internacia*

**JURA
TRIBUNO
INTERNACIA** §

N-ro 25
Jaro 2026:1
Internacia Jurista Esperanto-Asocio

ISSN: 3101-2965

Aperis la numero 25-a de la revuo "*Jura TRIBUNO Internacia*". Ĝi estas la sola revuo en esperanto kiu pritraktas ekskluzive jurajn temojn, kaj ĝi estas la oficiala organo de la Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunlaboras kun la eldonado de ĉi tiu revuo, kiu estas redaktata kaj presata ĉi tie en Andaluzio. Sur la 56 paĝoj de ĉi lasta numero aperas artikoloj pri justico kaj artefarita intelekto; la tomisma kritiko pri punigo de malamparoladoj kaj eseo pri la koncepto pri "seka marbordo" en la Internacia Juro.

La revuo estas libere legebla ĉe la ret-adreso <https://www.esperantojuro.org/revuo/jura-tribuno-internacia/>

Lastaj informoj pri 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Malago 9a - 13a de oktobro 2026

Trideko da homoj de 8 landoj jam aliĝis al la 22-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, kunorganizita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj de la asocio Esperanta Natur-Amikaro. Vera allogaĵo de la renkontiĝo estas la planataj ekskursoj, kiuj celas montri al ĉiuj vizitantoj la naturan belecon de la provinco Malago.


Tiel, partoprenantoj povos viziti imponajn naturajn lokojn, kiel la "*Caminito del Rey*" (pado por sekura promenado tra tre impresa interkrutejo), la kavernon de Nerŝo kaj promeni tra la belega vilaĝo Frigiliano aŭ koni pli detale la urbon Malago mem.

Kompreneble, programeroj rekte ligitaj al la internacia lingvo okazos dum la Kongreso. Tiel, la lasta libro de Ángel Arquillos "*Ekkrias la Poeto*", estos prezentata dum la Kongreso.

Memoru, ke por tiuj, kiuj deziras plilongigi sian ĉeeston en Andaluzio, estos eble post-kongrese viziti la urbojn Arundon (Ronda), Setenil de las Bodegas, kaj eĉ pli malproksime trapasi la ĝibraltaran markolon kaj vojaĝi en la urbon Ceŭton, en la nordo de la afrika kontinento.

Ne hezitu veni en Andaluzion kaj partopreni en ĉi tiu alloga kongreso. Pliajn informojn kaj aliĝilon vi trovos ĉe: www.esperanto.ac

GRAFIKA RAPORTO PRI LA KONGRESO



Kongresanoj povos resti kaj manĝi ĉe la kongresejo Dioceza Domo kontraŭ tre konvena prezo (ĝis elĉerpo de la ĉambroj disponeblaj)



Caminito del Rey.

Promenado tra impresa interkrutejo.



Kaverno de Nerĥo



Arundo



Ceŭto

REAKTIVIĜIS LA BANKO-KONTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Post kelkaj problemoj kun la banko okaze de la administrado de nia banko-konto, ni plezure informas al niaj membroj kaj simpatiantoj, ke la banko-konto:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Reaktiviĝis!

Se vi apogas kaj deziras kunlabori kun la Esperanto-movado en Andaluzio, ni proponas al vi membriĝi en Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. La jara kotizo estas 20 €, pageblaj en tiu banko-konto. Ni petas al vi, post la pago, sendi ret-mesaĝon al info@esperanto.ac, por informi pri la pagita kotizo. Multan dankon kaj ni kalkulas kun via kunlaborado.



VUELVE A ESTAR ACTIVA LA CUENTA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

Después de algunos problemas con la entidad bancaria por la gestión de nuestra cuenta bancaria, anunciamos a todos nuestros socios y simpatizantes que la cuenta:

Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698

¡ Vuelve a estar activa !

Si apoyas y quieres colaborar con el movimiento esperantista en Andalucía, te invitamos a hacerte miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto. La cuota anual es de 20 €, que puedes abonar en la cuenta antes indicada. Te rogamos que tras hacer el pago envíes un correo electrónico a info@esperanto.ac, informando del abono de la cuota.

Muchas gracias y contamos con tu colaboración.

TUTMONDIĜO KAJ MINORITATAJ LINGVOJ, NE TIOM MALAAMIKAJ RILATOJ

La bonfarta ekzisto kaj eĉ disvastigo de etnaj minoritataj lingvoj en la nuna kunteksto de tutmondiĝo reprezentas unu el la plej fascinaj paradoksoj de la nuntempa sociolingvistiko. Dum la tutmondaj rilatoj emas favori la hegemonion de “potencaj lingvoj”, kiel la angla, la ĉina aŭ la hispana, samtempe aperas mekanismoj kiuj faciligas la rezistadon, revivigon kaj disvastigon de aliaj lingvoj kun apenaŭ parolantoj, kiuj trovas en tiu tutmondiĝo, kaj ĉefe en interreto novajn spacojn por supervivi.

Ordinare, oni vidas la tutmondiĝon kiel iaspecan rul-premilon, kapablan disbati ĉion, kio ne estas konata en la tuta mondo. Tiel, la teorio pri la lingva konverĝo sugestas, ke por partopreni en la tutmonda ekonomio, la individuoj devas lasi siajn minoritatajn gepatrajn lingvojn, favore al aliaj pli pontencaj. Tamen, ĉi tiu vidpunkto ne estas tute certa.



Avenuo en granda urbo. Samaj vendejoj, samaj reklamoj kie ajn.

Tiel, la tutmondiĝo naskis la tiel nomatan “glokaligon”, tio estas la adaptado de tutmondaj enhavo al lokaj kunteksto. Do, la minoritataj lingvoj jam ne estas enfermitaj ene de izolitaj spacoj, dank’al la tumonda interkonektado kaj al transnaciaj migradoj. La Informaj kaj Komunikaj Teknologioj (ITK) ebligas ankaŭ la disvastigon de minoritataj lingvoj en nia mondo. Tiuj lingvoj antaŭe ne trovis internaciajn scenejojn por diskonatigi sin, tamen nuntempe,

junuloj parolantaj la keĉuan lingvon en Peruo aŭ la maorian en Nov-Zelando uzas platformojn kiel *TikTok* aŭ *Instagram* en sia propra lingvo, eĉ se minoritata, do, tiu komunikilo estas alirebla en la tuta mondo.



Lingvoj minoritataj, kiel la keĉua aŭ la maoria, estas klare videblaj en sociaj retejoj.

Aliflanke, la uzo de ITK ebligas, ke lingvoj kun tre malmultaj parolantoj, kaj eĉ sub risko de baldaŭa forpaso, povos havi alireblan deponejon, tio garantias, ke ili neniam perdiĝos tute. Tamen, malgraŭ ĉi tiuj koplodoj, la statistiko estas okulfrapa, laŭ studoj, unu lingvo malaperas ĉiujn du semajnojn, kaj la ĉefa kialo estas la tiel nomata “generacia interrompo”. Ĉi tio okazas kiam gepatroj ĉesas paroli tiun lingvon al siaj filoj, pro la percepto, ke tiu minoritata lingvo estas barilo al la ekonomia sukceso.

Kontraŭ tio, la tutmondiĝo garantias, en kelkaj kazoj, komercan valoron al la minoritataj lingvoj, kiuj altiras la atenton de turistoj emantaj lerni etnajn lingvojn, jen la kazoj, ekzemple, de la eŭska aŭ de la maja lingvoj, kiuj trovas homojn dezirantajn lerni ĝin en kiu ajn angulo de la mondo. Do, komunumoj posedantaj minoritatan lingvon povas postuli siajn lingvajn rajtojn ĉe internaciaj organizoj, kiel Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO.


La disvastigo de minoritataj lingvoj en nia globaligita mondo ne devas esti lukto inter kultura etna rezisto kontraŭ teknologia disvolvigo. Certe, tutmondiĝo estas la kaŭzo de malfortiĝo de multaj lingvoj, tamen ĝi ankaŭ konstruis scenejon por ilia renaskiĝo. La estonteco dependos de nia kapablo valorigi la lingvan diversecon en nia mondo, ne kiel muzean objekton, sed kiel instrumenton vivan kaj necesan por kompreni plene la homaron. Tiel, la vera riĉeco de la 21-a jarcento ne baziĝos sur la fakto, ke ni ĉiuj parolos tre disvastigitan lingvon, kiel la anglan, la ĉinan aŭ la hispanan, sed male sur nia kapablo traduki kaj navigi tra la senlimaj mondoj, kiujn ĉiu minoritata lingvo reprezentas.



El inolvidable Coco ha hecho por la comprensión de las preposiciones de lugar más que cualquier libro escolar. ¿Quién, ya con cierta edad, no recuerda aquello de que algo está sobre o bajo algo? Pues bien, recordando a Coco hoy vamos a hablar de cómo referirnos a algo cuando está debajo..

En esperanto utilizamos la preposición SUB, que tiene el mismo significado que en español, es decir que algo o alguien se encuentra bajo o debajo de algo. Hay que recordar que en la lengua internacional no es necesario indicar "de", así que *sub* ya indica por sí solo "debajo de". Veamos algunos ejemplos.

- *Koko estas sub la lampo.*
Coco está debajo de la lámpara.
- *Submarŝipo navigas sub la mara surfaco.*
Un submarino navega debajo de la superficie marina.
- *Ekzistas granda kvanto da akvo sub ĉi tiu fertila grundo.*
Existe una gran cantidad de agua debajo de esta tierra fértil.



*Koko:
Mi estas sub lampo.*

Para indicar que algo o alguien se encuentra debajo de algo utilizaremos la preposición *SUB*

***SUB* = bajo, debajo de.**

Tenemos que recordar también que, cuando la frase indica que existe un movimiento, el lugar debe aparecer en acusativo (-n). Esto lo explicamos mejor con algunos ejemplos:

- *La kato estas sub la tablo.*

Con esta frase imaginamos un gato que plácidamente duerme bajo la mesa.

- *La kato fuĝis sub la tablon.*

Esta frase es distinta. El gato ha huido (*fuĝis*), y el lugar al que se ha dirigido (*sub la tablon*) aparece en acusativo porque da la idea de un movimiento. En efecto el gato ha huído en dirección bajo la mesa.

Veamos algún ejemplo más:

- *Se okazas tertremo, serĉu taŭgan lokon sub rigida strukturo.*

Si ocurre un terremoto, busca un lugar adecuado debajo de una estructura rígida.


- *Ĝus okazis tertremo, iru rapide sub rigidan strukturon.*

Acaba de producirse un terremoto, ve rápidamente hacia debajo de una estructura rígida.

Vemos la diferencia: *sub* indica debajo de...; *sub* + acusativo significa ir hacia debajo de...



sub la tablo



sub la tablon

Añadiendo las terminaciones habituales del esperanto podremos formar palabras a partir de *SUB*. Veamos:

SUBA.

Hemos convertido la preposición *SUB* en un adjetivo, que tendría el significado de "de abajo, que está debajo de..." Ejemplos:

- *Prenu la suban libron* Coge el libro de abajo.
- *Mi iras en la suban etaĝon.* Voy a la planta de abajo.

SUBE.

Ahora nos encontramos ante un adverbio.

- *Mi ne trovis la ĉemizon, ĉar ĝi kaŝiĝis sube de multaj aliaj vestaĵoj.*

No encontré la camisa porque estaba escondida debajo de muchas otras prendas de vestir.

- *Sube de la dua etaĝo troviĝas advokat-oficejo.*

Debajo de la segunda planta se encuentra un despacho de abogados.

Si a *sube* o a *suba* le anteponeamos la partícula de aproximación *ĉi*, estaremos añadiendo una idea de cercanía.

- *Ĉi-sube aperas grava noto.* Aquí abajo aparece una nota importante.
- *Prenu la ĉi-suban libron.* Coge este libro de abajo.

Añadiendo "-a" a la preposición *SUB* formamos el adjetivo *SUBA* "de abajo".

Mi preferas la suban etaĝon.
Prefiero la planta de abajo.

SUBO.

Hemos convertido la preposición *SUB* en un sustantivo, la traducción sería, aproximadamente "lo que hay abajo". Y si queremos concretarlo en algo más material, podemos decir "*subaĵo*", que significaría literalmente "la cosa que está debajo". Recuerda que lo mejor es no traducir buscando una palabra que signifique exactamente lo mismo en español, o en cualquier otro idioma, lo importante es tener la idea de lo que expresa la palabra.

SUBIGI

Vemos que nos encontramos con un verbo. Hemos añadido a la preposición *SUB* el sufijo *IG*, que significa "hacer...". Una traducción aproximada de *subigi* sería "hacer que algo esté debajo", o menos literalmente "dominar", "someter. Veamos un ejemplo:

- *La soldatoj subigis la malamikojn.*

Los soldados sometieron (colocaron debajo) a los enemigos.

SUBIĜI

Hemos creado otro verbo partiendo de la preposición SUB. Esta vez le hemos añadido el sufijo "-iĝ", que significa "hacerse...". Así que *subiĝi* podría traducirse literalmente como "hacerse hacia abajo", o también descender.

Veamos algún ejemplo:

- *La fiŝoj subiĝis rapide, do mi povis kapti nenium.*

Los peces descendieron rápidamente, así que no pude pescar ninguno.

Por último, hay que recordar que la preposición "*sub*" también existe en español, convirtiéndose en muchas ocasiones en un prefijo que expresa la idea de que se encuentra debajo de algo.

Así, en español encontramos palabras como: suboficial, suburbano, subcontrata, subgrupo...

Pues en esperanto ocurre lo mismo. Oficialmente "*sub*" no es un prefijo, pero si colocamos esta preposición al inicio de una raíz estaremos expresando la idea de que algo se encuentra en una posición inferior.

- | | |
|--------------------------|--------------------------|
| • <i>Suboficiro</i> | Suboficial. |
| • <i>Subkontrakto</i> | Subcontrata. |
| • <i>Subgrupo</i> | Subgrupo. |
| • <i>Subtera fervojo</i> | Ferrocarril subterráneo. |

Aunque *SUB* oficialmente no es un prefijo, si colocamos esta preposición delante de una raíz estaremos indicando la idea de que se encuentra debajo.

***Subtera parkumejo* : Aparcamiento subterráneo.**

Y terminamos este artículo sobre la preposición SUB con una palabra que se utiliza cada día: *SUBSKRIBI*. Significa "firmar", pero como podemos ver, literalmente indica "escribir debajo", esto es así porque las firmas suelen ir debajo de lo que hemos escrito.

Rimo XVI

Se balkone viaj kampanoloj
flustras treme,
kaj vi kredas: vento ilin lulas
kareseme,
sciu: mi kaŝiĝas inter ili
sopirĝeme.
Se postdorse aŭdas vi konfuzan
bruon krian,
kaj vi kredas: nekonato krias
nomon vian,
sciu: mi vin el angul' malluma
vokas tiam.
Se noktmeze via kor' timfrapas
nebrideble,
kaj de ies arda spir' la lipoj
brulas febre,
sciu: apud vi mi kuŝas tiam
nevideble.



Gustavo Adolfo Bécquer

Tradukis: Kálmán Kalocsay



Nagejo

Sport-naĝejo



Sav-ringo



Rando

Akvo



Ŝtuparo aŭ ŝtupareto

Sukuristo




Profundeco




Naĝ-ringo

Kloro aŭ Hipoklorito



Trampolino aŭ Salto-tabulo



Duŝejo



Por-infana baseno

Sun-ombrelo



Bikino



Ban-tuko

Sun-protektilo



Ban-kalsono



Ban-kostumo



Ferdek-seĝo



Ban-ĉapo



Brakaj
Naĝhelpiloj



Mergo-masko

Vego



Akvo-pumpilo



Krado

Ekkurejo





Folioj por praktikado

La unua eŭropano, kiu vizitis Tibeton



Renée Triolle (Francio)

Alexandra naskiĝis en Francio en 1868. Ŝiaj gepatroj estis **liber-pensuloj**. La familio **transloĝiĝis** al Belgio kiam ŝi estis kvar-jara. Kiel junulino ŝi multe vojaĝis en Eŭropo. Ĉe la muzeo Guimet en Parizo ŝi **ekinteresiĝis pri** la aziaj artoj kaj kulturoj. Kiam ŝi havis 21 jarojn, ŝi konvertiĝis al budhismo. En Parizo ŝi studis Sanskriton kaj la tibetan lingvon, kaj poste en Bruselo ŝi studis muzikon kaj kantadon. En 1895 ŝi vojaĝis al la **tiam** Hindu-Ĉinio por fariĝi oper-kantistino ĉe la operejo de Hanojo, kaj efektive ŝi estis tie la ĉefa kantistino ĝis 1897.

Ŝi instruis en la pariza universitato Sorbonne, verkis artikolojn, kaj en 1911, ŝi, 43-jara, decidis **forvojaĝi** al **Barato** por studi budhismon. Ŝi diris al sia edzo, ke ŝi revenos post 19 monatoj, sed finfine ŝi revenis nur post 14 jaroj. En Barato ŝi gastis en pluraj budhismaj monaĥejoj, kaj en unu el ili ŝi renkontis junan monaĥon, Aphur Yongden, kiu tiam havis 15 jarojn. Li gvidis ŝin dum ŝiaj esploroj, kaj poste en 1929 **ŝi adoptis lin kiel filon**. Kun Yongden ŝi multe vojaĝis kaj renkontis plurajn religiajn gvidantojn. Ili vizitis monaĥejojn, kaj ankaŭ **pasigis iom da tempo** en kaverno, kie ŝi profundiĝis en la budhismajn instruojn.

Ŝi decidis viziti Tibeton, kiu tiutempe estis lando malpermesata al eksterlandanoj. Ŝin gvidis Aphur Yongden. Ŝi **vestis sin kiel almoz-petanton** kaj kaŝe vivis du jarojn en Lasao, la ĉefurbo de Tibeto. Post du jaroj, oni malkovris, ke ŝi estas nek viro, nek aziano, nek almozpetanto ... ĉar ŝi regule lavis sin. Tial ŝi estis tro "pura" por esti vera almozpetanto!

En 1946 ŝi revenis al Francio kun sia adoptita filo, Aphur Yongden, sed en 1955 ankaŭ li mortis tre subite. Alexandra **pluvivis** kaj daŭrigis sian verkadon dum preskaŭ 14 jaroj, ĝis ŝi mem mortis 100-jara en 1969.

> liber-pensuloj

Recordemos que el sufijo "-ul" indica a una persona caracterizada por la raíz de la palabra a la que acompaña. En este caso la palabra es compuesta, se trata 17

del verbo "*liber-pensi*" (pensar libremente), por lo que *liber-pensulo* podría traducirse como "librepensador".

> **transloĝiĝis.**

Nos encontramos con el verbo *transloĝiĝi* en tiempo pasado. Sabemos que el verbo *loĝi* significa vivir, pero en el sentido de habitar. Ejemplo:

- *Mi loĝas en Andaluzio.* Yo vivo en Andalucía.

El sufijo "*-iĝ*" significa "hacerse, convertirse...". Encontramos unida a este verbo la preposición "*trans*", que significa que algo está más lejano. Por lo que literalmente "*transloĝiĝi*" significaría "ir a otro lugar más lejano", es decir "cambiar de residencia" o "mudarse". Ejemplo:

- *Li trovis novan labor-postenon kaj pro tio, li devis transloĝiĝi al tiu urbo.*
Él encontró un nuevo puesto de trabajo y por eso tuvo que mudarse a esa ciudad.

> **ekinteresiĝis pri**

Nos encontramos con un verbo que cuenta con un sufijo y un prefijo. La raíz es "*interesi*" (interesar). El sufijo "*-iĝ*" lo hace reflexivo, así que "*interesiĝi*" vendría a indicar "interesarse". El prefijo "*ek-*" expresa la idea de algo que empieza, así que "*ekinteresiĝi*" significa "empezar a interesarse".

La preposición "*pri*" que le sigue, significa "sobre", en el sentido de que se trata "de algo", "sobre algo". Veamos otro ejemplo:

- *Ŝi fus legis libron pri Filozofio kaj tuj ŝi ekinteresiĝis pri tiu temo.*
Ella acababa de leer un libro sobre Filosofía y en seguida se empezó a interesar por ese tema.

> **tiam**

Del cuadro de voces simples recordamos que "*TI*" se refiere a algo que no se encuentra cercano, mientras que "*AM*" se refiere a tiempo. Su significado sería "en ese tiempo, entonces". Con una estructura similar encontramos a "*ĉiam*" (siempre, en todo tiempo); "*iam*" (en algún tiempo); "*neniam*" (nunca, en ningún tiempo).

"*Tiam*" podemos convertirlo también en un adjetivo, simplemente añadiéndole la terminación "*-a*". De este modo "*tiam*" podría traducirse como "la de ese tiempo, la de entonces". Veamos otro ejemplo:

- *Laŭ la opinio de la tiam Prezidanto, la asocio estus tute kontraŭa al tiu propono.*

Según la opinión del entonces Presidente, la asociación sería totalmente contraria a esa propuesta.

> forvojaĝi.

Hay morfemas que pueden unirse a los verbos, o simplemente acompañarlos sin llegar a unirse. El resultado en ambos casos es que la palabra a la que se une o a la que acompaña, se queda con el mismo significado aunque matizado con alguna característica.

En este ejemplo al verbo "*vojaĝi*" se le ha antepuesto el morferma "*for*", que significa "fuera, lejos". Podría traducirse como "viajar lejos". También podría haberse dicho lo mismo usando "*vojaĝi fore*". Veamos otro ejemplo:

- *Li prenis sian dorso-sakon kaj li decidis forvojaĝi ien ajn.*
Él cogió su mochila y decidió viajar lejos a cualquier lugar.

> Barato.

En el mundo occidental, a veces, tenemos una idea demasiado "eurocentrista" del resto del mundo. Así, solemos llamar al resto de los países según la denominación que a lo largo de la historia se le ha adjudicado a esas regiones, pero siempre desde un punto de vista hegemónico. Ese es el caso de la India. El nombre oficial de ese país, según su Constitución es *Bhārat Gaṇarājya*, por lo que los esperantistas de ese país dejaron de utilizar *Hindio*, y lo sustituyeron por un nombre más acorde a su cultura: "*Barato*" o "*Bharato*".

> Ŝi adoptis lin kiel filon.

Literalmente se traduce por "Ella le adoptó como un hijo". Podemos preguntarnos por qué "*kiel filon*" (como un hijo) va en acusativo. La respuesta es clara, "*filon*" se refiere a *lin* (él) que va en acusativo, por lo que van en el mismo caso. Veamos algunas diferencias con estos ejemplos:

- *Policano arestis lin kiel respondeculon de la krimo.*

Un policía le arrestó como responsable del crimen.

En este caso "*respondeculon*", que va en acusativo, se refiere a "*lin*", que también va en acusativo.

- *Policano arestis lin kiel respondeculo de la sekureco.*

Un policía le arrestó como responsable de la seguridad.

En este caso "*respondeculo*" no va en acusativo, por lo que no va referido a "*lin*", sino a la otra persona que aparece en la frase: al policía.

- *Mi elektas vin kiel sekretario de la asocio.*

Yo te elijo como secretario de la asociación.

En este caso "*sekretario*", que va en acusativo, se refiere a "*vin*", que también va en acusativo.

- *Mi elektas vin kiel sekretario de la asocio.*

Yo, como secretario de la asociación, te elijo.

En este caso "*sekretario*" no va en acusativo, por lo que se refiere a "*mi*".

Yo soy el que te elijo, porque yo soy el secretario de la asociación.

> **pasigis iom da tempo.**

Se traduce como "pasó un tiempo". Volvemos al cuadro de voces simples, recordemos que el morfema "I" se refiere a algo indeterminado, mientras que "OM" se refiere a una cantidad. Por lo que "*iom*" se podría traducir como una cantidad indeterminada, o menos literalmente "algo".

Le sigue la preposición "da" que usamos en esperanto para referirnos a una medida, a una cantidad. Veamos algún ejemplo:

- *Mi aĉetis du kilogramojn da terpomoj.*

Yo compré dos kilos de patatas.

- *Aldonu iom da salo en la salaton.*

Añade algo de sal a la ensalada.

> **Ŝi vestis sin kiel almoz-petanton.**

Lo traducimos como "Ella se vistió como una mendigo". "*Almoz-petanto*" va en acusativo porque se refiere a la otra palabra que va en acusativo en la misma frase, aunque en este caso, al ser un verbo reflexivo "*vesti sin*" (vestirse), sujeto y objeto directo coinciden. Por cierto, el autor podía utilizar también el sufijo "-iĝ", que convierte en reflexivo a los verbos. "*Vesti sin*" es igual que "*Vestiĝi*".

> **pluvivis.**

Se puede traducir como "vivió más (tiempo)". Como hemos visto antes, a los verbos se les puede anteponer una preposición para matizar su significado. Así, al verbo "vivir", se le puede anteponer la preposición "plu" (más tiempo). Veamos algún otro ejemplo:

- *Kvankam li emeritiĝis, li plulaboris dum kelke da tempo.*

Aunque se jubiló, trabajó durante algún tiempo más.



Trevélez situas je 90 kilometroj for de Granado. Temas pri vilaĝo tute ligita al la alta montaro Sierra Nevada, tra kiu fluas la rivero Trevélez. Temas pri natura enklavo, pordego al la plej altaj montopintoj de la Ibera Duoinsulo. La reliefo de la urbo kombinas la krutan altecon de ties tri kvartaloj (alta, meza kaj malsupra), kiuj eskaladas montoflankon, kun la profundaj kaj fekundaj valoj de la rivero. Temas do, pri belega vilaĝo ĝuanta la tradician kulturon de la granada Alpuhara kaj la sovaĝa natura medio de la Nacia Parko Sierra Nevada.



Blazono de Trevélez

La tuta zono havis homan ĉeeston ekde la Neolitiko. Por la unuaj tieaj enloĝantoj, la valo de la rivero Trevélez kaj la protekto de Sierra Nevada estis elstaraj naturaj elementoj por kontroli la paŝtejojn kaj certigi izolitan sed sekuran vivon. Poste, alvenis la romianoj, kiuj ne lasis profundan spuron pro la malfacila aliro, sed ili ja komencis ekspluati la naturajn rimedojn de la areo. Tiel, la nomo mem de la vilaĝo devenas de la unuaj romiaj setlejoj, kiuj nomis la lokon "Inter-valles", kvankam aliaj studoj asertas, ke la nomo devenas el la araba lingvo, kun la signifo "bela loko".

La plej brila kaj difina epoko alvenis poste, dum la al-andalusa periodo. La islamanoj transformis la tutan Alpujaron kaj kreis la reton de terasoj kaj irigaciaj kanaloj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ ekzistas. Trevélez, danke al sia neatingebla pozicio, fariĝis ideala rifuĝejo kaj defendfirmejo. En la 15-a jarcento, post la konkero de la Granada Regno fare de la Katolikaj Gereĝoj, la regiono ĉefrolis okaze de la ribelo de la moriskoj (islamanoj perforte konvertitaj al kristanismo). Trevélez estis unu el la lastaj bastionoj

de tiu rezistado sub la gvidado de lokaj ribelantoj, ĝis kiam la trupoj de Don Juan de Austria definitive venkis ilin en la 16-a jarcento. Konscia pri la risko de senhomigo, la kastilia krono forpelis la moriskojn kaj reloĝigis la vilaĝon per kristanaj familioj alvenintaj el Galegio, Leono kaj Kastilio. Tiuj novaj loĝantoj alportis siajn proprajn tradiciojn, kiuj miksiĝis kun la islama heredaĵo.

Dum la frua moderna epoko, la izoliteco de la vilaĝo fariĝis ĝia plej bona aliancano por disvolvi unikan agadon, tio estas, la ellaborado de porkaĵoj, dank'al la malvarma neĝa temperaturo. Ĉi-sence en la jaro 1862, la reĝino Elizabeta la 2-a donis al la ŝinko de Trevélez la privilegion porti la reĝan sigelon, agnoskante ĝin kiel oficialan provizanton de la Kortego danke al ĝia nekomparebla kvalito.

En la nuntempa epoko, Trevélez evoluis de pure tero- kaj brut-prizorga socio al vigla turisma kaj gastronomia municipo ene de la provinco Granado. Hodiaŭ la vilaĝo ekvilibrigas la modernan disvolviĝon de sia tutmonde fama ŝinko-industrio kun la rigora konservado de sia tradicia alpuhara arkitekturo kaj sia unika kultura identeco meze de protektita natura paradizo.

Monumentoj

Paroĥa Preĝejo de Sankta Benito

Ĉe la Malsupra Kvartalo stariĝas la plej grava religia monumento en la vilaĝo. Ĝi estis origine konstruita en la 16-a jarcento sur la fundamentoj de antikva moskeo el la nazaria epoko. Ĝi estas perfekta ekzemplo de la alpuhara mudeĥara stilo, kvankam ĝi devis esti rekonstruita post la gravaj damaĝoj suferitaj dum la hispana enlanda milito.



Preĝejo de Sankta Antonio kaj de la Virgulino de la Neĝoj.

Ĉi tiu antikva ermitejo troviĝas sur la Meza Kvartalo, ĉi tiu preĝejo stariĝis dum la 18-a kaj 19-a jarcentoj. Laŭstile, ĝi estas tipa alpuhara preĝejo, kun sia blanka kalkita fasado. Ene de ĝi videblas figuroj de Sankta Antonio kaj de la Virgulino de la Neĝoj. Ĝi estas la kerno de la religiaj festoj de Trevélez.



Fontoj kaj Tradiciaj Publikaj Lavejoj.

En Trevélez, la akvo estas viva monumento. La vilaĝo havas aron da historiaj fontoj kaj publikaj lavejoj konstruitaj el ŝtono kaj masonaĵo, kiuj revivigas la historion de la loko. Elstaras la Fonto de la Kaŝtan-arbo, la Fonto de la Placeto kaj la Fonto de la Preĝejo.

Rigardejo de la Era del Fuerte.

Ĉi tiu antikva “era” en la hispana lingvo, draŝejo en esperanto, tio estas plata cirkla ŝtona spaco, kiun oni antaŭe uzis por draŝi grenon, troviĝas en la Alta Kvartalo, proksimume je

1700 metroj alte. Hodiaŭ ĝi utilas kiel balkono, el kiu estas eble rigardi la plej belan monumentan panoramon de la tri kvartaloj de la vilaĝo, la profundan valon de la rivero Trevélez kaj la pintojn de Sierra Nevada.



Festoj

Supreniro al Mulhacén.

Jen unu el la plej belaj festoj en la tuta Hispanio. Okazas dum la nokto de la 4-a ĝis la 5-a de la monato aŭgusto. Trevélez-anoj kaj vizitantoj supreniras dumnokte en la pinton de la monto Mulhacén, la plej alta monto de la Iberia Duoninsulo je 3482 metroj alte. La celo estas akompani la figuron de la Virgulino de la Neĝoj. Tie, meze de la alta montaro kaj okaze de la sunleviĝo, estas celebrata meso.

Festoj de Sankta Antono.

Meze de la monato junio okazas festo honore al Sankta Antonio. La plej elstara momento estas la reprezentado de batalo inter maŭroj kaj kristanoj, teatraĵo kiu memorigas la historian al-andalusian pasintecon kaj la postan kristanan konkeron de la Alpuhara.

Festo de la Kaŝtanoj aŭ de la Mauraca.

Komence de la monato novembro, okazas tradicia aŭtuna festo. Tiam Trevélez-anoj renkontiĝas surstrate ĉirkaŭ grandaj ĝoj-fajroj por rosti kaŝtanojn (nomataj *mauracas*) kaj trinki vinon. Temas pri momentoj de profunda komunuma vivo, por celebri la finon de la somera sezono kaj la alvenon de la unuaj neĝoj sur la altan montaron.

Gastronomio

La gastronomio de Trevélez estas rezulto de la alta montaro kaj la malvarma klimato de Sierra Nevada, do, temas pri fortiga, simpla

kaj bongusta kuirarto, taŭga por kontraŭstari la montaran malvarmon.

Sendube la ŝinko de Trevélez estas la stelo en la tuta regiono. Ĝi estas porkaĵo nature kuracita per la seka kaj freŝa aero de Sierra Nevada, sen pliaj artefaritaj aldonaĵoj. Ties gusto estas unike dolĉa kaj mola.

La plej tipa kaj energi-dona kuirajo estas la Alpuhara Plado. Sur ĝi kombiniĝas lokaj terpomoj, frititaj ovoj, ŝinko, porka lardo kaj tradiciaj kolbasoj.

Sed ne ĉio estas porkaĵo en la Treveleza gastronomio. Pro la proksimeco de neĝaj riveroj, estas eble trovi freŝajn trutojn. Kutime ĉi tiu fiŝo estas kuirita ene de forno kun pecoj de ŝinko interne de ĝi.

Venontnumere Turismi en ... Frigiliana (Malago)





Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

***Alfonso Barranco Medina,
jaena esperantisto kaj socialisto.***

Alfonso Barranco Medina naskiĝis en Jaeno en la jaro 1900. Junaĝe, li komencis labori kiel funkciulo en la Urbodomo de Malago, tie li aliĝis al hispana armeo, kie li atingis la suboficiran rangon de serĝento. Post Malago, li okupis labor-postenon en la Urbodomo de Jaeno. Li baldaŭ komencis agadi en la Socialisma Sindikato de Municipaj Funkciuloj.

En Jaeno, li interesiĝis pri la internacia lingvo, tie li fariĝis tre lerta esperanto-parolanto. Kiam eksplodis la civila milito, li aliĝis al respublika armeo, tiam li reakiris sian antaŭan rangon de serĝento.

Kiam la milito finiĝis, li estis enkarcerigita kaj poste kondamnita je 20 jaroj da malliberigo. Li restis en prizono ĝis la jaro 1942, poste li estis forsendita en la vilaĝo Medina Sidonia (Kadizo), kun malpermeso reveni en Jaenon.

Fine, li revenis en ĉi tiun urbon. Tie, li tuj aliĝis al la tiutempa malpermesita socialisma partio en Jaeno. Li agadis kiel delegito de la partio por faciligi la kontaktojn inter



Alfonso Barranco Medina
1900 ~ 1979

la kaŝita socialisma partio en Jaeno kaj la malgrandaj grupoj en kelkaj vilaĝoj. Post amasa aresto de socialistaj aktivuloj en Jaeno en la jaro 1946, li denove eniris en la karceron, kune kun aliaj 27 membroj de sia partio. Nova juĝo kondamnis lin je 12 jaroj da malliberigo.

Kiam li eliris el la prizono, li komencis labori kiel terkulturisto. Komence de la 1960-aj jaroj, li partoprenis denove en la reorganizado

de la socialisma partio en Jaeno, li organizis kaj ofte partoprenis en renkontiĝoj de sia partio, kaŝitaj pro la tiama frankisma diktaduro. En tiuj

jaroj li ankaŭ aliĝis al Hispana Esperanto-Federacio.

Alfonso Barranco Medina forpasis en Jaeno en la jaro 1979.

ADRESARO

(DIRECTORIO)

DE LOS ASOCIADOS A LA

FEDERACIÓN ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

Marqués de Caro, 6 - VALENCIA

SEPTIEMBRE 1962

AEN

- 689 — Anguita Galán, Juan. Capitán Oviedo, 9.
1.286 — Barranco Medina, Alfonso. Millán de Prie-
go, núm. 83.
890 — Burgos Mancebo, Manuel. J. Tenorio, 4.
1.284 — Carrascosa Orts, Teodoro. Avda. Madrid,
número 43, 1.ª.
754 — Molina Muñoz, Felipe. Av. Generalísimo, 1.



Ĉu vi deziras kunlabori
kun nia revuo?




Ni bonvenigas
viajn artikolojn

fotojn, desegnaĵojn,

informojn
ktp.

Kontaktu kun:
info@esperanto.ac





$$E = mc^2$$


Scienca Angulo

La paradokso de la ŝipo de Tezeo

Laŭ klasika legendo, tuj post reveni en Atenon la ŝipo, per kiu vojaĝis la heroo Tezeo, estis gardita en la haveno kiel relikvo, laŭ la deziro de multaj atenaj civitanoj. Tamen, tra la jaroj, la lignaj tabuloj komencis putriĝi. Kiam peco de la ŝipo difektiĝis, la ĉarpentistoj forigis ĝin kaj anstataŭigis tiun pecon per alia nova, identa kaj kun pli fortika ligno. Dek jarojn poste, post senĉesa prizorgado, ĉiuj tabuloj, najloj kaj ŝnuroj de la ŝipo estis ŝanĝitaj.

Tiam la filozofo Plutarko lanĉis demandon, kiu tormentas cerbojn dum pli ol du jarmiloj, ĉu ĝi ankoraŭ estus la sama ŝipo de Tezeo? Kaj eĉ por malfaciligi eblan respondon, jen alia demando, se iu gardis la malnovajn kaj putrajn tabulojn kaj oni povus rekonstrui la originalan ŝipon, pecon post peco, kiu el ambaŭ ŝipoj estus la aŭtentika navigilo de la greka heroo?

Ĉi tiu dilemo, kiu dum jarcentoj ŝajnis esti simpla vortludo por distri enuigitajn filozofojn, fariĝis hodiaŭ unu el la plej fascinaj kaj perturbaj realaĵoj de la moderna biologio, ĉefe se ni konsideras, ke la ĉefrolulo de ĉi tiu historio ne estas la ŝipo de Tezeo ankrita ĉe greka haveno, nun la ŝipo de Tezeo estas ni mem.



Ni kutimas imagi nian korpon kiel solidan kaj neŝanĝeblan strukturon, kiel brikan domon en kiu ni loĝas dum nia tuta vivo. Sed la molekula scienco diras al ni alian aferon, ni pli similas al kirlvento aŭ al marondo. Ni konstante ŝanĝas la materion, kiu donas al ni formon, dum ni konservas la eksteran strukturon.

La ĉeloj de nia korpo havas limdaton. La ruĝaj ĉeloj, kiuj transportas oksigenon tra nia sango, vivas apenaŭ 120 tagojn. La haŭto de nia vizaĝo renoviĝas tute ĉiujn du aŭ kvar semajnojn, do, ni elmontras novan vizaĝon ĉiun monaton, ĉu ne? La interna tegaĵo de nia stomako, pro korodaj acidoj de digestado, detruigigas kaj rekonstruiĝas ĉiujn kvin tagojn. Eĉ niaj ostoj, kiuj ŝajnas la plej malmola

parto de nia anatomio konstante remodeliĝas.

Ĉi tiu reciklado ne okazas pro magiaj fortoj. Ĉiufoje kiam ni manĝas, trinkas aŭ spiras, ni enkorpigas novajn atomojn el nia ĉirkaŭaĵo kaj oni forpelas tiujn malnovajn. Science, ni anstataŭigas la ekvivalenton de nia propra korpa pezo en atomoj ĉiujare. Tiel, se vi rigardas foton de vi mem de antaŭ jardeko, vi devas scii, ke preskaŭ neniuj el la atomoj, kiuj konsistigas tiun infanon aŭ adoleskanton, estas hodiaŭ en via korpo. Versajne, vi estas fremdulo por via “mi” de la pasinteco!

konsistigas ĝin interne, detruigas kaj rekonstruiĝas senĉese. Oni povus diri, ke la ujo restas, sed la enhavo ŝanĝiĝas.

Do, se la materio ne difinas nin, kio estas ni reale? La respondo de la neŭroscienco estas, ke la identeco ne loĝas en la fizikaj brikoj, sed en la ŝablono. Ni estas la informo, la kontinueco de niaj neŭronaj konektoj kaj la fadeno de niaj memoroj.

Estontece, kiam la teknologio ebligos anstataŭigi membrojn per perfektaj bionikaj protezoj, aŭ kiam la artefarita intelekto proponos la eblon



♥ SANGĈELO ♥

HAŬTĈELO

★ OSTO ★

Do, estus logike serĉi iaspecan lastan tabulon de la ŝipo de Tezeo, por pruvi, ke ni ankoraŭ estas ni. Dum longa tempo oni pensis, ke tiu rifuĝejo estus la cerbo. Estas vere, ke la plimulto de la neŭronoj de nia cerba kortekso akompanas nin de kiam ni naskiĝas ĝis nia morto. Tamen, la molekula ĥemio pruvis, ke kvankam la strukturo de la neŭrono restas, la proteinoj, molekuloj kaj atomoj, kiuj

verŝi nian menson en komputilon, la paradokso de Tezeo ĉesos esti teorio kaj fariĝos leĝo. Finfine, ni akceptu ĉi tion, ni estas miraklo de la fiziko, konstanta fluo de stelpolvo, kiu ŝanĝas sian formon ĉiun sekundon, por ke vi, rigardante vin antaŭ spegulo, povu ankoraŭ rekoni vian propran rigardon.



Flamenko

La Triana Kvartalo en Sevilo

Trairi la Ponton de Izabela la 2-a, pli konata kiel la Ponto de Triano, ne estas simple pasi de unu riverbordo de la rivero Gvadalkiviro en alian. Pli ĝuste diri, ke estas eniri en unu el la plej gravaj spiritaj kaj kulturaj rezervejoj de Andaluzio. La urbo Sevilo mem estas gravega ĉefurbo de la flamenka arto, sed ene de Sevilo ekzistas epicentro, kie ĉi tiu arto estas forĝita kaj kuirita malrapide, jen la kvartalo Triano.

Por kompreni la gravan rolon de la kvartalo Triano en la flamenka arto, ne sufiĉas fari liston enhavantan la artistojn, kiuj naskiĝis aŭ loĝis tie. Oni devas kompreni unue, ke dum jarcentoj ĉi tiu kvartalo funkciis kiel izolita kaj unika ekosistemo, pro la kunvivado inter la cigana kaj la ne-cigana komunumoj.

Historie, Triano estis ekstermura kvartalo, humila kaj marista, loĝata de kamparaj laboristoj, maristoj kaj grandega komunumo de ceramikistoj kaj ciganoj. La persekutado de la tiamaj leĝoj pelis la ciganan loĝantaron loĝi en ĉi tiu flanko de la rivero. Ĝuste en la intimeco de ĝiaj famaj najbaraj kortoj, komunumaj loĝejoj aranĝitaj ĉirkaŭ

centra korto, la flamenka arto trovis sian idealan medion. Ĉe ĉi tiuj kortoj, la kantado kaj la dancado ne estis pagita spektaklo, ankaŭ ne reguligita profesio, temis ja pri ĉiutagaj viveroj. Oni kantis por forpeli la malĝojon, por celebri naskiĝojn, por bedaŭri forpasojn aŭ simple por akompani la ritmon de la ĉiutagaj laboroj en la ceramikejo aŭ en la forĝejo.

La kvartalo Triano ne nur akceptis la flamenkon, tie oni donis al ĝi propran muzikan personecon. La Triana kantado karakterizas sin per sia modesteco, sia forto kaj korŝira sento, kiu ofte rezignas pri superflujaj ornamaĵoj en sia serĉo de la plej profunda sento fare de la kantisto.



En ĉi tiu Triana etoso naskiĝis flamenkaj stiloj, kiel la *Soleá de Triana*, kiu neprigas grandegan voĉan kaj emocian kapablojn. Same, la forĝejoj kantoj akompanitaj nur de la kadenco de la martelo kontraŭ la amboso. La *Alborás* kaj la Tangoj estas kantaĵoj kiuj akiris en Triano unikan ritmon.

Rilate kantistojn, naskiĝis en Triano legendaj kantistoj kiel Pastora Pavón, konsiderata kiel la plej grava virina voĉo en la historio de la flamenka arto. Kaj antaŭ ne multe da tempo en Triano naskiĝis Lole kaj Manuel (Manuel Molina kaj Lole Montoya) kiuj en la 1970-aj jaroj revoluciis la flamenkan kantadon, dank'al novaj muzik-instrumentoj. Ili sukcesis konekti kun pli junaj generacioj, sed ne perdante la aromon de la kortoj de Triana.

Aliaj konataj flamenkaj artistoj en Triano estis El Titi, Matilde Coral aŭ Naranjito de Triana.

Meze de la 20-a jarcento, la urba disvolviĝo de Seviljo kaj la planoj por malkonstrui la humilajn loĝejojn en Triano kaŭzis la malaperon de multaj najbaraj kortoj. Granda parto de la cigana loĝantaro de Triano estis translokigita en aliajn novajn kvartalojn de la urbo. Ĉi ĉio detruis la tradician socian reton de Triano, laŭ fakuloj tiam finiĝis la ora epoko de la flamenka arto en Triano.

Tamen, ne ĉio malaperis. Hodiaŭ ekzistas en Triano aro da flamenkaj spektaklejoj, danc-akademioj kaj flamenkaj societoj, kiuj altiras la atenton de amatoroj de ĉi tiu popola arto, ĉefe de tiuj kiu serĉas la originajn fontojn de la flamenko, tie, kie ĉi tiu arto naskiĝis.





Fervojista Angulo

La vaker-filmaj trajnoj de Almerio

Dum la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj delapasintaj jarcento, la seka pejzaĝo de la dezerto de Tabernas en la andaluzia provinco Almerio, transformiĝis en la usonan malproksiman okcidenton dank'al la kin-kameraoj de majstraj filmoj kiel *"La bonulo, la malbelulo kaj la malbonulo"* 1966, aŭ *"Iam en la Uesto"*, de 1968, ambaŭ de la itala reĝisoro Sergio Leone. En tiuj filmoj, preter la ponĉoj, la spronoj kaj la muziko de Ennio Morricone, aperis ĉiam la fervojo, kiel metala brua ĉefrolulo en tiuj filmoj.

En tiuj filmoj, la vagonaroj ne estis nuraj transportiloj, ĝi reprezentis la progreson, la senkompatan kapitalismon kaj la fonon de limregionan perforton.

Kiel dirite, tiuj, kaj multaj pliaj vakeraj filmoj, estis filmitaj en la almeria dezerto. Kompreneble, venigi antikvajn lokomotivojn el Usono en Andaluzion estis neeble pro buĝetaj kialoj. La solvo aperis dank'al la tiama Hispana Fervoja Kompanio (RENFE), kiu ankoraŭ konservis funkciajn plurajn vapor-lokomotivojn en la andaluziaj linioj. Ĉi tie, la stacidomo de Guadix en Granado, ludis fundamentan rolon, ĉar tie ekzistis lokomotiva deponejo.

La produkto-teamo de Leone, kunlabore kun lokaj mekanikistoj, atingis verajn miraklojn por ke la hispanaj lokomotivoj estu similaj al tiuj de Nord-Ameriko, kaj ĉion oni faris tute per-mane. Oni aldonis al



la lokomotivoj pli larĝan kamen-tubon, grandegajn antaŭan lanternojn kaj la famajn “bovo-forpuŝilojn” aŭ metalajn kojnojn ĉe la nazo. La pasaĝer-vagonoj estis ankaŭ tegitaj per malnovaj lingaj panelojn por imiti la estetikon de la linioj de la Unio kaj de la Konfederacio.

Hodiaŭ, tiuj forlasitaj trakoj, la malnovaj stacidomoj kaj aliaj restaĵoj de la filmo-dekoracio, kiuj estis konstruitaj por la filmoj de Sergio Leone apartenas al la arkeologia industria heredaĵo de la eŭropa kino. La trajnoj de Leone pruvis, ke la beleco de la andaluzia reliefo povis



Juan Miranda, rolita de la aktoro Rod Steiger, observas la alvenon de vagonaron en la filmo "Klinu la Kapon" de 1971.

La pinto de la rilato de Leone kun la trajnoj okazis en la jaro 1968 okaze de la filmo "*I am en la Uesto*" (originala titolo: *C'era una volta il West*). La argumento de la filmo temis ĝuste pri la alveno de la fervoja linio al la Pacifika marbordo. Do, Leone ordonis konstrui en la vilaĝo Tabernas tranĉeon kaj veran fervojan trakon ekskluzive por la filmo. Aliaj fervojaj konstruaĵoj de Almerio ankaŭ utilis al la itala reĝisoro, ekzemple la stacidomo de Almerio mem, kun sia bela arkitekturo el fero kaj vitro, simulis esti vigla meksika stacidomo dum la revolucio, okaze de la filmo "*Klinu la kapon*" (*Giù la testa*) de 1971.

aspekti kun absoluta fideleco la mitan vastiĝon de la usonaj limoj.



fervojista@esperanto.ac
<https://hafe-19.websself.net>

FIS-HISTORIO

La ŝipo estis arĝenta giganto. Ĝia haŭto estis ellaborita de la plej fortikaj kunfanditaj metaloj iam trovitaj sur la Tero. Ĝia cerbo estis miloj da precizaj instrumentoj. Ĝia koro estis atoma motoro. En ĝiaj plast-tubaj vejnoj fluis viviga oksigeno kaj elektro. Kaj interne de ĝia stomako, viroj kuŝis sur siaj litoj...

Estu pretaj! Ni ekflugas!

Evakuu la ekflugejon!

Pretaj!

La giganto estis nova rekruto de la Galaksia Esploro-Patrolo. Ĝi kaŭris sur lanĉ-platformo, atendante, ke la homoj interne de ĝi, startu la motorojn, por ke ĝi vojaĝu en la spacon okaze de sia unua esplora flugo...

Pretaj post 10 sekundoj:
Dek, naŭ, ok, sep, ses,
kvin, kvar...



La metala giganto tremis pro antaŭĝojo. Tri, du, unu... La sekundoj pasis. Tiam, kun potenca muĝo de siaj ĵus naskitaj atomaj motoroj, la giganto saltis en la noktan ĉielon, en la vastan senfinecon de la spaco... ĝi ekflugis.

Blua planedo! Ni baldaŭ atingos vin.

Kia ajn estas via sekreto... ni malkovros



AL
WILKINSON

Tra la senfina abismo de la spaco, sur sia blua planedo, la eksterteruloj laboris intense, interne de siaj obskuraj laboratorioj. La lumo de ilia mortanta suno videblis tra la stranga atmosfero de ilia blua planedo...

Alia fiasko!

Tagoj pasas kaj la detruo de nia civilizacio proksimiĝas pli kaj pli, kaj tamen ni ankoraŭ ne trovis solvon.

Post du pliaj monatoj, nia mortanta suno subite ekbrilos pli kaj pli hele... ĝis ĝi eksplodos kiel novao.



...kaj nia atmosfero vaporiĝos kaj ni ĉiuj estos detruitaj.

Kaj ni povas fari nenion kontraŭ tio. Niaj plej lertaj mensoj eklaboras por solvi tion, sed ili atingas nenion...



Se ekzistus eblo forlasi nian planedon kaj trovi novan hejmon, antaŭ ol malaperi!

Ĉksgrfo, venu tuj!

Kio estas, Zlafa? Kion vi rimarkis?

Jen veturilo! Ĝi vojaĝas tra la spaco kaj ĝi estas ege rapida. Ĝi venas en nian planedon. Rigardu ĝin sur la ekrano!

Fremda ŝipo kapabla fari tion, kion niaj plej lertaj sciencistoj ne sukcesis atingi... flugi tra la spaco!!



La eksterteruloj de la blua planedo rigardis, surprizitaj, kiel la mirinda veturilo eniris en ilian strangan bluan atmosferon...

Jen nia savo! Tiu ŝipo povas flugi tra la ekstera spaco. Se ni povus kapti ĝin, ni povus kompreni kiel ĝi funkcias...

Kaj eĉ konstrui pliajn ŝipojn por savi nian civilizacion. Vi pravus!



Ili rigardis dum la mirinda ŝipo alvenis sur la varmegan surfacon de la blua planedo. La atmosfero bolis, ĝi estis plena da vapor-bobeloj.



Kiam la vapor-bobeloj supreniris en la atmosferon kaj la ŝipon kviete apogis sin sur la fundon, la eksterteruloj naĝis ĉirkaŭ ĝi.

Vidu, Zlafg! Videblas vizaĝoj ene! Kiaj strangaj kreaĵoj! Ili ne havas blankojn.



Ĝia granda nazo dilatigas. Eble ili spiras tra tiu protuberanco.



Vidu, ne ekzistas atmosfero ene de la ŝipo

Se ili eliras eksteren, ni povus kapti ilian ŝipon.



Kompreneble, ili ne eliros. Ili ne povus vivi en nia atmosfero.

Zlafg! Se ili ne povas vivi en nia atmosfero. Ni povus mortigi ilin, se nia atmosfero plenigas la ŝipon.



Sed, kiel Ĉksgrfo? Ili povus eliri kaj eskapi en la supraĵon.


Mi trompos ilin, Zlafg! Mi agos amikeme kaj ili fidus pri mi.



Mi altiros ilian atenton. Vi, Ĉksgrfo, agu laŭ akordita plano!

La eksterterulo nomita Zlafg naĝis kaj piruetis ĉe la likva atmosfero de la blua planedo. Interne de la ŝipo, oni vidis tiun scenon simpatie.

Tuj, tondra bruoj estis aŭdata. Enorma eksplodo provokis grandan truon en la metala ŝelo de la ŝipo.



Daŭrigu, Zlafg! Mi preskaŭ finis.

Rapide, Ĉksgrfo! Mi estas laca.



La eksterteruloj vidis kiel la likva atmosfero eniris en la ŝipon, la akvo plenigis la kontrol-ĉambron, ĉio eniĝis en akvon.



La planoj de la eksterteranoj inundi la ŝipon sukcesis. Ene de ĝi, la ŝipanoj luktis por supervivi, sed tio ne estis ebla. Ili rapide sufokiĝis ene de la likva atmosfero.



Tiam, la eksterteranoj eniris en la ŝipon, ili flosis senprobleme en tiu atmosfero. Ene de la ŝipo, ili atente observis ĉion.

La eksterterano Zlafg prenis la registro-libron, li eklegis tiujn strangajn skribaĵojn...

Ĉi tiuj strangaj entoj venis de planedo kun gasa atmosfero, do ne likva.

Jen, registro-libro de ilia vojaĝo.

Ĉu vi komprenas ĝin?

Jes, temas pri tre simpla idiomato. Ĉi tie oni diras, ke la planedo estas kovrita de akvo!

Ŝajnas, ke ili eltrovis nin.

Kovrita de akvo?
Kio estas akvo? Mi tute ne scias. Ĉi tie oni parolas pri "granda oceano". Kio estas tio?



Jen kelkaj mapoj. Vidu: en ilia planedo ekzistas blujaj kaj verdaj zonoj.

Kaj sur la blujaj zonoj ĉiam aperas la sama vorto "oceano". Jen la Atlantika Oceano.

Do, se nia atmosfero estas simila al tiuj oceanoj, la planedo de ĉi tiuj entoj estas taŭga por nia civilizacio.

Ni povus iri tien kaj post nia dominado, bluiĝi la tutan planedon.



Zlafg rigardis ĉirkaŭ ĝi...

Ni devas ripari la truan provokitan de ni, ekstre de la ŝipo. Poste, ni povos enirigi ĉi tien nian likvan atmosferon.

Sur la ekrano aperas la vojo en ilian planedon



Ni elektos niajn plej bonajn sciencistojn kaj ni sendos ilin tien.

Ni aranĝos multajn vojaĝojn, ĝis kiam ni estos sufiĉe fortaj en tiu planedo.



Poste, ni detruos ĝin.

Ek, ni havas taskojn plenumendajn!



Dum la sekvantaj tagoj, dum la suno de la blua planedo paliĝis, la eksterteranoj laboris intense en la kaptita ŝipo. Ili studis, riparis kaj mastrumis ĝin

Tamen, subite...

Zlafg! Nia suno pli kaj pli brilas

Ĝi fariĝas nova!

Ni disponas pri malmulte da tempo. Avertu la elektitajn vojaĝantojn, ni devas tuj foriri.



La elektitaj, uloj kaj inoj, alvenis tuj. Ili floris en la likva atmosfero de la ŝipo.

Zlafg startis la motorojn. La ŝipo tremis, vaporo eliris el la tuboj. La ŝipo ekflugis.

Preta!

Preta!



La ŝipo eliris el la likva atmosfero de la blua planedo, en la spacon...



La eksterteruloj flosis en la ŝipo, plena da blua atmosfero. Ili agadplanis, konspiris...

Ni ne povos reveni por transporti pliajn.

Nur ni devos lukti kontraŭ... tiom da miloj.



La ŝipo vojaĝis tra la vakua kaj nigra spaco je ne-kalkulebla rapideco...

Ni revenos en nian primitivan sistemon de reproduktado, demeti ovojn...

Post 12 cikloj, ni estos milionoj!

Kaj kiam ni estos sufiĉaj...

Rigardu! Jen nia celo!



Tiam la planedo Tero ekaperis... verda kaj blua sfero... tute senzorga kaj neavertita.

Direkte al tiu blua granda zono

Laŭ la mapo, ĝi nomiĝas "Oceano Atlantika".




La eksterteruloj stiris zorgeme la kaptitan ŝipon. Ili malsupreniris tra la gasa atmosfero en la "oceanon". Ili mergiĝis sub la mara sala surfaco post enorma eksplod-bruo.

Kaj kiam la kaptita ŝipo kviete sidiĝis sur la oceanan fundon, ili tuj prepariĝis...

Malfermu la kluzpordon!

Tuj, Zlafa!



Dume, ĉe la kontrol-ĉambro de la Galaksia Esplor-Patrolo ĉiuj agadis rapide. Homoj parolis per multnombraj mikrofonoj. Aliaj studis grandan mapon de la Atlantika Oceano...

Ĉi tie, ĝuste ĉi tie! Ili estas frenezuloj. Ili falis en la plej profunda regiono de la Oceano.

Ni ne sukcesos savi ilin. Ili mortas.

Krome, la ŝipo estis ege moderna.



La oficioj kaj la sciencistoj rapide rigardis mortajn flosantajn fiŝetojn, kun blanka ventro kaj ostetoj apud la buŝo.

Sendube la potentaj motoroj mortigis ilin kaj ili emerĝis el la plej profundaj abismoj.

Ili aspektas strange, ĉu ne? Kion vi opinias, profesoro?



Kvankam la milit-ŝipo provis remeti flose la ŝipon, fine ĉiuj streboj estis forlasitaj.

Eĉ se ili disponis pri oksigeno, ĝi, antaŭ multe da tempo, tute certe elĉerpiĝis.

Ĉu ni forlasas, kapitano?




En tiun punkton de la Atlantika Oceano alvenis milit-ŝipoj por trovi postvivantojn.

Kial ili decidis fali ĉi tien? Eĉ se temis pri urĝa surterigo, ĉi tio estis absurdaĵo.

Jen la ĝusta loko, kapitano!

Rigardu!



La profesoro, fakulo pri oceanografio, ne trovis taŭgan respondon...

En la maraj abismoj ekzistas miloj da specoj neniam antaŭe viditaj de la homoj, kapitano. Se vi ne kontraŭas, mi volus preni kelkajn el ili kiel specimenojn.

Kompreneble, profesoro. Malsuprenirigu boaton!



La kapitano kapjesis...

Ni strebis, tamen ni ne sukcesis. Ili jam forpasis. Sed, profesoro, vi almenaŭ havas vian novan specimenon.

Mi eltrovis strangan aferon, kapitano. Mi ekstudis ĉi tiun novan fiŝon kaj mi vidas ke temas pri fiŝo ne-toleranta la salan akvon.



FINO

Nia asocio eldonis novan libron !

En la esperanto-literaturo ĵus aperis nova verko. Temas pri poem-libro de Ángel Arquillos eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, sub la titolo “*Ekkrias la Poeto. Poemoj kaj Hajkoj*”. Ĉi tiu verko mergiĝas en la vastan, sed ne-esploritan, teritorion de la sonĝoj, la fantazio kaj la persona introspekto, proponante ankaŭ delikatan elekton de hajkoj, kiuj kaptas la belecon de la efemeraĵo.

Ángel Arquillos jam verkis aliajn poem-librojn, kaj en la hispana kaj en esperanto. Ĉi-foje, la poeto malfermas la pordojn de la sonĝoj kaj li invitas al leganto “*komforte sisi sur silka imago brakseĝo*”. De tie, li proponas mensan vojaĝon por flugi super la malbono kaj la problemoj de la ĉiutaga vivo.


Unu el la plej kortuŝaj aspektoj de ĉi tiu poemaro estas la honesteco. La aŭtoro, pere de la melankolio kaj la lumo, aliras sian literaturan procezon:

“Kiam mi malĝojas, mi verkas pri malĝojo disde mia fantazio, sed mi aldonas pozitivajn vortojn. Preskaŭ neniam pri mi, kvankam ĉio eliras el mia koro; pro tio, en ĉiu ero de miaj poemoj estas peco de mi kaj de mia fantazio.”

Tra siaj vortoj, Ángel Arquillos montras, ke kiam menso flugas libere “*tra elpensita galaksio*” ĉio imagebla estas vera, kaj kvankam unua-vide la poemoj povas aspekti pesimismaj, ekzistas profunda vero kaj espero en ĉiu verso, se oni legas ilin atente.


La enirigo de hajkoj en la verko havigas al la leganto malpezan kaj minimumisman ritmon. La internacia lingvo, danke al sia fleksebla strukturo kaj sia riĉa kapablo formi precizajn metrikojn, pravas, ke ĝi estas la ideala vehiklo por transkultura poezio, unuigante la japanan tradicion de la hajko kun la andaluzia sentemo de la aŭtoro.

Ĉi tiu eldono, prizorgita de Ángel Arquillos kaj de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, estas ne nur donaco por la esperantistaro, sed klara pruvo, ke la literaturo en la internacia lingvo daŭre vivas, pulsante nun kun la universala forto de la sonĝoj kaj la fantazio. Do, jen literatura vojaĝo por tiuj, kiuj kuraĝas mergiĝi en ties paĝojn por loĝi, almenaŭ dum kelkaj minutoj, en la fascina mondo de la aŭtoro.



nun ni

junulara paĝo



Andaluzia Junulara Esperanto-Uniĝo - AJEU

◉ Kiel vi jam scias, la venonta Internacia Junulara Kongreso de la Esperanto-Movado okazos en Tiana (Barcelono) de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026. La renkontiĝo koincidos kun mirinda natura fenomeno. La 12-an de aŭgusto oni povos spekti en tiu zono plenan suneklipson. La eklipso nur estos kompleta en la nordaj regionoj de Siberio, okcidente de Islando, en Grenlando kaj en la nordo de Hispanio, do, la partopreno en la proksima IJK estos mirinda ŝanco por vidi unikajon.

◉ ¿Te gusta el mundo de las banderas?
¿Quieres saber más de vexilología -la ciencia que las estudia-? Y todo ello en esperanto.

Por si no lo sabes, hay un grupo de esperantistas que son aficionados al mundo de las banderas. Se trata de VENTO. Se publica una revista en el idioma internacional sobre este tema, la publicación es accesible y gratuita para todo el mundo en esta dirección www.esperanto.ac/vento. También estamos trabajando para crear una asociación sobre el tema. Si te interesa contactar con nosotros: vento@esperanto.ac

◉ Y no olvides que hasta el 31 de agosto está abierto el plazo para inscribirse en un curso de esperanto a distancia que organiza la Unión Juvenil Esperantófono de Andalucía. El curso es gratuito y los materiales serán provistos por la asociación también de manera gratuita. El nivel del curso es para principiantes (niveles A). Contacta con ajeu@esperanto.ac




SAKO

Enfilo pecon



Enfilo kontraŭan pecon estas unu el la plej potencaj, oftaj kaj detruaj taktikaj rimedoj en ŝakludo. Oni diras, ke peco estas “enfilita” (aŭ ligita) kiam ĝi ne povas, aŭ ne konvenas, moviĝi, ĉar, se ĝi farus tion, ĝi lasus malkovrita pli valoran pecon, kiu troviĝas ĝuste malantaŭ ĝi.



La blanka kuriero enfilas nigran turon, antaŭ ĝi, sur la diagonalo troviĝas ĉevalo, kiu ne konvenas movi, se tiel, la kuriero kaptus senprobleme la nigran turon.


Enfilo ĉiam enhavas tri agantojn en rekta linio:

- La atakanta peco (enfilanto). Nur longdistancaj pecoj povas enfilati, tio estas Damo, Turo aŭ Kuriero. Ĉevaloj kaj peonoj neniam povas enfilati, ĉar ili ne minacas je longa distanco.
- La meza peco. Ĝi estas la peco, kiu restas “kaptita” meze de la rekta linio. Ĝi kutime estas malpli valora ol tiu malantaŭa valora peco, kiu estas minacata.
- Valora peco. Ĝi estas la kaŝita celo. Ĝenerale ĝi estas la Reĝo mem, la Damo aŭ alia valora peco.

Ne ĉiuj enfiloj estas identaj. Depende de la peco, kiu troviĝas malantaŭe, la reguloj de la ludo ŝanĝiĝas, tiel:

Absoluta netuŝebla enfilo.

Ĝi okazas, kiam la malantaŭa peco estas la Reĝo. Nu, ĉi-kaze estas malpermesite movi la mezan pecon. Se oni movus ĝin, oni metus propran Reĝon en kontraŭleĝan ŝakon. Ekzemple:





En la antaŭa pozicio la blanka Kuriero enfilas la nigran Reĝon, meze troviĝas nigra Ĉevalo, kiu ne povas esti movata. Do, temas pri netuŝebla enfilo. Tiu Ĉevalo ne povos moviĝi ĝis la Reĝo foriĝos de tie. Do, la nigra Ĉevalo estas tute senutila peco.

Relativa Enfilo.

Ĝi okazas kiam la minacata malantaŭa peco estas valora, ekz. Damo aŭ Turo, sed ne la Reĝo. La ludanto povus movi la mezan pecon, se oni volas, sed strategie tio kutime estas memmortigo, ĉar oni perdus altvaloran pecon.



Ĉi-kaze, la blanka Kuriero enfilas nigran Turon, tamen meze troviĝas Ĉevalo. Nigroj povas movi la Ĉevalon, tamen se tio okazas, blankoj povus kapti altvaloran pecon: la Turon.

Ora regulo en ŝakludo asertas, ke meza peco en enfilo fariĝas celo. Kion oni devas fari? Nu, la respondo estas simpla, la plej bona daŭrigo estus ataki la mezan pecon (Ĉevalon laŭ la antaŭa ekzemplo) per pli da pecoj, ĉefe per tiuj malpli valoraj, ekz. peonoj. Tiel, se oni atakas mezan pecon per simpla peono, ĝi ne povas forkuri, do la rivalo estas devigita perdi tiun pecon, ekz. Ĉevalon, interŝanĝe de peono. Grandega materiala avantaĝo!

Kaj kiel eskapi se oni suferas tian atakon? Nu, ekzistas tri ĉefajn manierojn rompi tiun enfiladon:

- Movi la enfilitan pecon -tiun malantaŭan-. Tio estas, oni devas demeti la Reĝon aŭ la altvaloran pecon de la paflinio. Tuj kiam ĝi flankiĝos, la meza peco reakiros sian liberecon.
- Intermeti alian pecon, prefere malpli valoran pecon meze. Ekzemple, se Turo troviĝas meze de paflinio kontraŭ Reĝo (absoluta enfilo), intermetu Ĉevalon aŭ Kurieron ĝuste antaŭ la Turo.
- Ataki la atakantan pecon. Do, minacu la pecon, kiu vin enfilas, por devigi ĝin retiriĝi aŭ akcepti interŝanĝon.

La enfilado estas afero, kiu aperas en preskaŭ ĉiuj matĉoj. Lerni vidi ilin antaŭtempe evitos perdi pecojn, aŭ kontraŭe, se oni kapablas antaŭvidi tiujn poziciojn, estos eble ataki sukcese la “frostigitajn pecojn” de la rivalo.



Monato

estas sendependa internacia esperantlingva magazino kun artikoloj pri politiko, kulturo, moderna vivo kaj aliaj temoj. Ĝi estas presata en Belgio, kaj havas legantojn en 65 landoj. Temas pri unika revuo, ĉar por ĝi raportas nur korespondantoj el la lando mem, kiuj do, bone konas la lokan situacion.

Abon-tarifoj por 12 numeroj:

Papera versio sendita per ter-poŝto: 68 €

Papera versio sendita per aer-poŝto: 70 €

Bitva versio: 39 €

Peranto de la revuo MONATO en Hispanio: ueaperanto@esperanto.ac



Esperanto, ponto inter popoloj



Puente de lata ~ Lad-ponto en Durcal (Granado)

Skolta Mondo



VAG-VOJAĜOJ

Unu el la plej interesaj agadoj en la Skolta Movado estas la “vag-vojaĝo”, ankaŭ konata kiel “superviva promenado” aŭ “aŭtonomeca itinero”. Ne temas pri simpla promenado en la Naturo, reale ĝi estas testo de persona kreskado, matureco kaj profunda ligo kun la medio.

En kio konsistas la vag-vojaĝo?

Etaj grupoj aŭ individue, depende de la aĝo, kvankam ĉi aventuro estas vivata de skoltoj inter 14 kaj 16 jaroj, ricevas mapon, kompason kaj itineron, kiun ili devas deĉifri. Ili devas porti ĉion necesan por supervivi, tio estas akvon, minimuman manĝaĵojn kaj vel-tolon por sen-tende ripozi sur kamparo. Kutime poŝtelefonoj estas malpermesitaj, aŭ almenaŭ enmetitaj en sigelita koverto, nur uzebla kaze de grava krizo.

La defioj dum la vag-vojaĝo

La vag-vojaĝo ne estas nur marŝado, dum la vojo oni proponas diversajn agadojn, inter ili:



1. La socia defio. Kelkfoje la itinero pasas tra malgrandaj vojaĝoj, tie la skoltoj devas interagi kun la lokanoj. Klasika defio estas peti lokon por tendumi, ekzemple, ĝardeno aŭ privata kamparo. Same, oni proponas interŝanĝojn, ekzemple proponi la laborforton de la skolto en kampara laboro kontraŭ interŝanĝo de vespermanĝo aŭ sekura loko por nokti. Ĉi ĉio detruas antaŭjuĝojn kaj instruas la valoron de homa fido.

2. Tempo por pripensado. La vag-vojaĝo ofte inkludas devigan paŭzon ĉe bela loko, ekz. sur montopinto, ĉe riberbordo... Tie, la skolto pasigas plurajn horojn en soleco. Ĝi estas tempo kaj loko por pritrakti siajn personajn celojn, siajn valorojn. Ofte, eĉ oni proponas al skolto skribi leteron al sia “estonta mi mem”.



3. Esplorado. Inter la devoj plenumotaj dum la vojaĝo, oni povas asigni al skolto, ekzemple intervui la plej maljunan loĝanton de la vilaĝo, priskribi lokajn tradiciojn, koni la historion de forgesita ĉapelo en la kamparo aŭ katalogi la flaŭron de specifa areo.

Vere, la vag-vojaĝo de la skoltoj transformas la junulon. Li aŭ ŝi devos eliri el la komforto de kontrolita etoso. Kompreneble, kiam la vojaĝo finiĝas, la skoltoj revenas lacaj, foje eĉ tute disbatitaj. Tamen, kutime ili revenas kun grandega memfido. Ili rimarkas, ke ili kapablas solvi problemojn, kiel trovi taŭgan vojon en la kamparo, aŭ protekti sin kontraŭ malbona vetero. Tamen, ili ofte plifortigas la skoltan devizon “Scii fidi je si mem”.





Andaluza Kuirarto

Alpuhara Supo

La Alpuhara-suppo, ankaŭ konata kiel “migdala stufajeto”, estas unu el la plej fama kaj bongustaj pladoj de la regiono Alpuhara, inter la provincoj Almerio kaj Granado. Ĝi estas taŭga ekzemplo de la humila kaj kampara kuirarto de Andaluzio, sed kun delika gusto, heredita rekte de la al-andalusaj kuirarta tradicio, kie la nuksaj fruktoj estis la reĝoj de la stufajetoj.

Kvankam ĉi tiu plado nomiĝas “supo”, ĝi ne havas finan teksturon, male vere temas pri malpeza kremo aŭ dense ligita supo. Por kuiri ĝin estas necesaj nek laktaĵoj nek kremo, la tuta kremeco kaj korpo de la Alpuhara supo devenas de la pistado de frititaj migdaloj, pano kaj ajloj.

Jen la ingrediencoj por 4 homoj:

- Krudaj migdaloj, proksimume 25.
- Oliv-oleo
- Ajloj, 4
- Malmola pano, 4 maldikaj tranĉaĵoj.
- Frititaj pan-tranĉetoj.
- Kokid-buljono, ½ litro.
- Malmole kuiritaj ovo, 2.
- Tranĉita ŝinko, 100 gr.
- Cepo, ½.
- Petroselo, nur kiel ornamo.



Krudaj
migdaloj



Oliv-oleo




Ajloj



Malmola pano



Frititaj
pan-tranĉetoj



Boligita ovo



Kokid-buljono



Tranĉita ŝinko



Cepo



Petroselo

Jen la elaborado:

1) En pato, ni metas la ajlerojn, la migdalojn kaj la malmolan panon por rostando.



2) Poste ni metas ĉion enen de elektra pistujo. Ni pistas ĉion, verŝante ankaŭ kuleregon da kokid-buljono.



3) Ene de la restanta kokid-buljono ni varmigas la pistaĵon.



4) Aliloke, ni fritetas cepon (1/2), oni povas aldoni safrenon kaj iomete da tomato. Aldonu tranĉitan ŝinkon kaj movu ĉion dum unu minuto.



5) Aldonu al ĉi tiu fritiĵo la antaŭan pistaĵon. Kuiru ĉion dum 5 minutoj.

6) Verŝu la kuiradon ene de la pladon. Aldonu la malmole kuiritajn ovojn, la tranĉitan ŝinkon, la frititajn pan-tranĉetojn kaj sur ĉio, kiel ornamaĵon, la petroselon.



BONAN APETITON!

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Fenicaj sarkofagoj en Kadizo

La urbo Kadizo, la dujarmila Gadir, kaŝis sub siaj stratoj la sekreton de unu el la plej gravaj fenicaj nekropoloj en Okcidente. En la jaro 1887, hazarde oni malkovris meze de la urbo monumentan pecon. Temis pri sarkofago de viro el blanka marmoro, laŭ fakuloj, la figuro datiĝis de la 5-a jarcento a.K. La skulptaĵo reprezentis barban viron kun serena mieno kaj egiptaj influoj. Ĉi tiu eltrovo helpis la fondiĝon de la arkeologia fako de la Muzeo de Kadizo.

Al ĉi tiu muzeo venis kiel direktoro en la jaro 1904 la arkeologo kaj historiisto Pelayo Quintero Atauri (1867-1946). Surbaze de la tradiciaj entombigoj de la fenica aristokrataro en paroj, Pelayo Quintero eldiris hipotezon, laŭ kiu, sendube, devus ekzisti alia sarkofago, ĉi-foje por virino. Do, tiu ebla sarkofago devus esti kaŝita ie ajn ene de la kadiza subtero.

Verdire, ĉi tiu konkludo fariĝis obsedo en la menso de Pelayo Quintero. Dum preskaŭ 40 jaroj, li kontrolis ĉiun foson malfermitan ekster la urbo-muroj, kun la espero

trovi la fenican “damon”. Entute li partoprenis en la elfosado de miloj da tunoj da tero. Tamen, la fortune evitis lin, ĉar li neniam trovis “ŝin”.




Pelayo Quintero Atauri

Frustrita kaj laca post duona vivo da vanaj serĉoj, la arkeologo forlasis Kadizon en siaj lastaj vivo-jaroj, li mortis en Tetuano en la jaro 1946, sed konvinkita, ke la kadiza subtero ankoraŭ gardis grandan sekreton.

Hazarde, en la jaro 1980, dum elfosado por starigi la fundamentojn de konstruaĵo en la strato Ruiz de Bustamante en Kadizo, la fos-maŝino trafis kompaktan strukturon. Plurajn metrojn sube, entombigita dum jarcentoj aperis la sopirata “Damo


de Kadizo”, la belega ina sarkofago kun skulptita figuro de krispa hararo, tenanta ujon por oleoj. Jen la sarkofago sopirata de la arkeologo Pelayo Quintero.



Sarkofago eltrovita
en la jaro 1887


La scienca surprizo estis grandega, sed la vera frapo venis kiam oni ekzamenis la historiajn mapojn de la areo. La ĝusta punkto, kie la Damo restis kaŝita dum 2500 jaroj, troviĝis precize sub la antikva ĝardeno de la feria bieno, kie Pelayo Quintero mem kutimis ripozi dum siaj kampanjoj. La arkeologo, kiu dediĉis sian vivon al la esplorado de ĉiu angulo de la kadiza duoninsulo, dormis, manĝis kaj

promenis tagon post tago nur kelkajn metrojn sur la trezoro, kiun li serĉis, sen suspekti, ke lia sopirata damo atendis lin, pacience, ĝuste sub liaj piedoj. Tiu poezia justeco transformis la obsedon de tuta vivo en unu el la plej grandaj koincidoj de la arkeologia historio.



Sarkofago eltrovita
en la jaro 1980

Nuntempe, ambaŭ sarkofagoj troviĝas en la Muzeo de Kadizo, ĝuste ene de salono dediĉita al la fenikapunika epoko. Ili kuŝas unu apud la alia kaj sendube temas pri la plej valoraj pecoj de la tuta arkeologia kolekto de la provinco.



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2								
3								
4								
5								
6								
7								
8								

HORIZONTALA

1. Parto de rektio inter du punktoj.
2. La plej alta perfekteco. ■ Sur la luksemburgaj aŭtomobiloj.
3. (*Plurale*) Diversagenraj eŭbakterioj en formo de rekta bastoneto. ■
4. Havi koran inklinon al iu. ■ (*Inverse*) Egala.
5. (*Sen la lasta vokalo*) Tio, kion devas diri aŭ fari aktoro en teatraĵo aŭ filmo ■
(*Sen la lasta vokalo*) Nomo de mondfama germana baroka muzikisto.
6. Finaĵo de la verboj en infinitivo. ■ Sur la hispanaj aŭtomobiloj. ■
Malmola organo de la vertebruloj.
7. (*Sen la lasta vokalo*) Nomo de familio de anglaj suverenoj en la 16a kaj 17a jarcentoj. ■ (*Sen la lasta vokalo*) Ĉelo, produktata kaj ellasata de la inoj de animaloj, enhavanta ĝermon de estonta samspeca animalo.
8. Finaĵo por montri kvanton ĉe la Tabelo de Simplaj Vortoj en esperanto.
■ Unu el la satelitoj de Saturno.

VERTIKALE

- A. Homo tre amanta vivon molan kaj komfortan, dediĉitan al la plezuro.
- B. Nederlando urbo, tre fama pro siaj bongusta fromaĝoj. ■ Sufikso sen difinita senco, uzata por derivi vortojn, kies rilato al la radiko estas malpreciza kaj ne esprimebla per alia.
- C. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Granda delikata ĝuo. ■
- Ĉ. (*Inverse*) En iu tute ne difinita tempo. ■ ■ ■ (*Inverse*) Partikulo montranta logikan sekvon, konkludon el la antaŭa diritaĵo.
- D. Fari per produktocela peno.
- E. (*Inverse kaj akuzative*) Regno, konsistanta el insuloj en Oceanio. ■ Ronda vokalo.
- F. Sur tajlandaj aŭtomobiloj. ■ (*Akuzative*) Ŝipo uzata por privataj plezurvojaĝoj.
- G. Konjunkcio esprimanta diferencon. ■ Sur la svedaj aŭtomobiloj. ■ Ĉelo, produktata kaj ellasata de la inoj de animaloj, enhavanta ĝermon de estonta samspeca animalo.

Rebuso



Kio estas celata de kampara ŝtelisto?

*Mi rompiĝas, se vi diras mian
nomon. Kiu mi estas?*



SOLVOJ AL LA VORTO-LUDOJ DE LA PASINTA NUMERO

T	R	U	S	K	E	N	O
A	E	R	O		T	I	O
B	L	A	N	K	A		G
L	O	G	O		N	A	
O		A		N	A	M	E
J	A	N	U	A	R	O	N
D	R	O	N	I	G	I	
O	G	N	U	M		K	E

REBUSO:

Oni proponis jenajn demandojn:

Kie troviĝas Estonio?

Aperis jenaj bildoj:

Libero B tre alta + grupo de literoj M

Tio estas: Apud B alta M-aro

El kio rezultas: **Apud Balta Maro**

ŜARADOJ

• *Mi flugas, sed mi.....* LA NUBO.

• *Apud vi, mi ĉiam...* LA OMBRO.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Alejandro Burgos Escalante
José M^a Rodríguez Hernández
Carlos Spinola
Juan Díaz Casado
Alejandro Pinos Cabello
Yousef Hamdi el Farouki

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org



MALAGO, 9-13a de oktobro 2026

VERDA LINGVO POR VERDA NATURO

Esperanto por daŭripova mondo

4a
NaturAmika
KuturSemajno
en Esperanto



22a Andalusia
Kongreso de
Esperanto

*Kiam la naturo parolas,
ni elektas komunan lingvon.*

Inter la rokoj kaj akvo de El Caminito del Rey.
ni memoras ke la Tero ne bezonas multajn lingvojn —
nur unu kiu respektas, kunigas kaj protektas.

Aliĝu!

<https://kulturservo.esperantio.net/evento/>

nakseake-2026



Esperanto — vojo inter homoj kaj naturo

